

Verschiĝint maandelijks
Achtthende jaargang
Nummer 9 (207)
SEPTEMBER 1951

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. E.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

INTERNACIAJ SOMERAJ KURSOJ

27 JULIO—2 AŬGUSTO EN SOESTERBERG (NED.)



La Rondo Familia en Soesterberg
(foto de Leon Besbrugge, artfotografio, Gent)

Rapide, tro rapide pasis la semajno, dum kiu pli ol 90 geverdsteluloj estis kune por ĝui agrablan ferion kaj ensorbi la saĝajn vortojn, elbuŝigitajn de la kursgvidantoj s-roj Th. v. Gindertaelen, A. J. Kalma kaj A. Weide.

La 27-an de julio dank' al la bonaj zorgoj de la administranto, s-ro C. B. Zondervan, ĉiuj alvenintoj, provizitaj per bona humoro, kantareto kaj listo de partoprenantoj trovis siajn litojn, esploris la terenon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn kaj kaptis la okazon konatiĝi kun la aliaj, kiuj iom post iom alvenis. Bedaŭrinde ĉiuj ne ŝufice frue venis por okazigi la oficialan malfermon jam posttagmeze. Sed post la tagmanĝo s-ro Zondervan povis bonvenigi oficiale la kursanaron, kvin ĉefestraranojn de L.E.E.N. kaj la prezidanton de la ekzamena komitato s-ron G. J. Degenkamp, kiu feriante kun sia edzino en la proksimo, kaptis la okazon pasigi kelkajn horojn en nia rondo. Inter la ĉeestantoj ni vidis multajn gekonatojn, sed ankaŭ novulojn. Partoprenis ne nur nederlandanoj kaj flandroj sed ankaŭ kvar gefrancoj, du svedinoj kaj s-ro O. S. Magnusson el Islando.

Matene je la 7-a horo bruis la sonorilo kaj s-ro F. Weeke per belsona tamburinado kaptis plurajn viktimojn, kiuj kun dolortorditaj mienoj submetis sin al liaj rafinitaj torturoj, kiujn li eŭfemisme nomis „matengimnastiko“. Inter tempe la deĵoranta stabo jam pretigis la matenmanĝon por ĝenerala maĉado je la 8-a horo. Je la 9-a la lernemuloj amasiĝis ĉirkaŭ la kursgvidanto ĉu en bela arbara ravino, ĉu en la konversacia salono kaj la aliaj sunbanis sin, vagis tra la arbaroj aŭ alimaniere amuziĝis. Post la kaftrinkado sekvis dua kurso kaj post ĝia fino ĉiuj kolektiĝis por la komuna lunĉo. Sabaton kaj mardon ankaŭ posttagmeze okazis kursoj, sed en la aliaj tagoj oni uzis

la posttagmezojn por esplori la belajn ĉirkaŭaĵojn, ĉu ekskursante bicikle (du homoj sur unu biciklo) al la naturbanejo en Soestduinen, ĉu per aŭtobuso al Spakenburg kaj la piramido de Austerlitz. Tiuj, kiuj ne ekskursis, trinkis kune teon je la 3.30 h. Je la 6-a horo ĉiuj denove kolektiĝis por ĝui abundan tagmanĝon, sekvis horo por remaĉado, ripozado kaj babilado kaj jam la konversacia salono pleniĝis, ĉar je la 8-a horo la skandalanta sonorilo anoncis la komenciĝon de la vespera programo. Plurfoje diversaj talentplena muzikistoj kaj kantistinoj ravis nin per siaj artismaj kapabloj antaŭ ol komenciĝis la prelegoj. La programo menciis i.a. interesajn lumbildprelegojn



Kursgvidantoj Th. v. Gindertaelen, A. Weide kaj A. J. Kalma kaj administranto C. B. Zondervan
(foto de Leon Besbrugge, Gent)

de s-ro F. G. Makkink pri birdmigrado kaj de s-ro C. B. Zondervan pri la sekiĝo de la Suda Maro. Mardon la 31-an de julio deklamis s-ino R. Köhler van Ghelder kaj s-ro O. Magnusson rakontis pri Islando.

En la paŭzoj kaj post la prelegoj pluraj verdsteluloj eskapis por praktiki la plej novan sporton „gearbarumado“, kiu kun la lumbildprojekciado en la salono havis almenaŭ ion komunan, nome la fakton, ke ĝi okazis en plena mallumo... Jam antaŭ noktmezo la severa mastro komencis sian ĉasadon kaj eĉ minacis kugle trabori feriantan germanan policiston, kiu post la streĉa vetkurado sensoifigis sin per alkoholaĵoj, kontrabanditaj de kolego-kursgvidanto. Sur apuda herbejo oni per piedpilko praktikis alian sporton, kiu kontraste kun la jus nomita okazis ĉe plena sunlumo. Laŭ fakuloj ĝi estis „volleyball“, sed envere ĝi pli similis hibridan sporton devenantan de piedpilko, manpilko kaj aliaj sportoj.

La brulanta suno dum pluraj sinsekvaj tagoj kaŭzis iom-post-ioman malaperon de diversaj vestaĵoj kaj ĝuste en la momento kiam kelkaj kursanoj demandis sin, kiel daŭrigi la senvestigon, subita pluvduŝo savis la situacion.

Lundvespere la tuta rondo familia aŭtobusis al Zeist, kie la loka L.E.E.N.-sekcio prezentis varian programon, kiu menciis i.a. kantadon, pianmuzikon, deklamadon kaj kelkajn teatraĵetojn.

Soifaj kursanoj jam baldaŭ fariĝis kutimaj gastoj ĉe „De Witte“ en Amersfoort kaj „t Zwaantje“ en Soesterberg, kaj la libro-servo de L.E.E.N. kiu tiel bone negocis, ke ĝi povis eĉ oficiale malfermi filion, kie oni vendis ĉokoladon, mentpastelojn, kukojn kaj aliajn bongustaĵojn, zorgis pri tio, ke ankaŭ la frandemuloj povis regali sin laŭ sia gusto.

Jaŭdmatene diversaj fotoĝoj provis la paciencon de la rezignacie pozanta homamaso, kiu laŭordone ĉiufoje denove kurbigis la lipojn je afabla rideto kaj per alia procedo kelkaj desegnistoj eternigis siajn viktimojn.

En la adiaŭa vespero oni aŭdis la diversajn lingvojn kaj eĉ dialektojn de la kursanoj. S-ro Weide kaj lia malfidela (teatra) edzino ludis tiel nature, ke ili preskaŭ frakasis la improvizitan scenejon kaj s-ro Kalma prezentis anatoman lecionon (ne tiun de Rembrandt). Bieramaj flandroj stafed-glutis bierimitaĵojn; kelkaj virseksaj kursanoj montrigis pli fleksigemaj ol iliaj kuraĝaj rivalinoj kaj tri plenkreskaj viroj kondutis stulte kaj infancece por akiri malbonkvalitan cigaredon. „Sjoe“ senvole kaŭzis ridedsplojojn per sia sukplena frisa dialekto „pardonu „lingvo“. Kompreneble ankaŭ muziko kaj kantado okupis gravan parton de la lastvespera programo. Auskultis afablajn dankvortojn la kursgvidantoj kaj s-ro C. B. Zondervan, kiu krome ricevis donacon.

La sekvan matenon la kursgvidantoj adiaŭis la kursanojn; lastfoje oni kune lunĉis kaj... finiĝis la sukcesplena aranĝo, kiu efikas kvazaŭ refreŝiga (sun) bano kaj donis al la multaj partoprenintoj novan energion, necesan por daŭrigi plenkuraĝe la pacan batalon.

A. J. Kalma

Medicina Rubriko

Susterbergaj Piloloj

Sukces', sukces', sukceso!
La scienco en progreso!
Forigis la doloroj,
Sanigis multaj koroj;
Perdigis bagateloj, -
Ĉu iĝis kor' el reloj?
Jes, eniuloj zumis,
Ke oni „arbarumis“,
Envis pri am-uzo,
Ĉi fonto de amuzo...
Sed edzoj kun edzino
Virtadis kun obstino;
Fraŭlinoj maturagaĵ
Sin sentis eksterkaĝaj,
Kaj edzoj sen edzino
Eltenis ĝis... la fino!
Ĉiumatene Weeke
Tamburis ĉiujn veke:
Femuroj ĉiuspecaj
Aspektis ofte decaj.
Kuracis suno arde
Kaj ĉiuj kantis barde:
La „sonĝo de l' omaro“
(Eĉ sen veterinaro)
Efektivigis bene!
Satisĝis ĉiuj plene:
La vegetara ago
Fiaskis nur sur lago...
Oni per... revolvero
Nin tenis en karcero,
Kaj Zondervan sek-sprite
Gvidadis lerte, ŝvite:
Ordonoj plenumigis
Kaj ni nur „teumigis“(?)
Pri biermank-torturo
Konsolis „litra turo.“
La gram-atiko: ĝi ne tedis,
„Kilo-atike“ ja ne knedis...
Weide-aj monologoj
Sanigis per riddrogoj.
Dum festo unu Muzo
Nur ploris pro rifuzo,
Gi eble troe sanis
Kaj tial ne deklamis...
En Zeist la apogeo:
Murdigis ja... Morfeo!
Glutigis nun piloloj
Kaj - viglaj apostoloj -
Ni kune kun „Makkinka ar“
Birdmigris jen al freŝa far'!

TYNEVERUM

ANTVERPENO, URBO DE NIA KONGRESO

(fino)

Je la fino de la 15-a jc. estis aperinta brila stelo ĉe la flandra artfirmamento. Quinten Matsys, amiko de Erasmus, Dürer kaj Thomas Morus. Lia pentrarto estis ankoraŭ la pure flandra, sen enmiksigo de fremdaj elementoj. La kolorefekto estas rava; la komponado drama kaj kortuŝa. Lia „Entombigo de Kristo“ en nia muzeo de Belartoj indus ja specialan viziton al Antverpeno!

Inter la aro da postaj pentristoj, kiujn pli inspiris la renesanca movado, estis eksterlande laŭvalore taksata Joos van Cleve (1490-1511), kiun François I venigis por fari lian portreton. Francisko Floris (1517-1540), alia frato de la arĥitekto, ankaŭ famigis kaj formis multajn lernantojn. La portret-kaj pejzaĝpentristoj restis pli naciaj ol la aliaj. De Francisko Pourbus, la juna (1569-1622) Louvre kaj aliaj muzeoj posedas majstrajn verkojn. Denizo Calvaert formis skolon en Bolonjo. Georgo Hoefnagels (1545-1610) kaj Bartolomeo Spranger (1546-1627) iris Germanujon kaj fariĝis la ŝatataj pentristoj de la imperiestro.

Glora artisto originala estis ankaŭ Petro Brueghel (1525-1569) fantaziega, realista pentristo vere flandra pri la ĝojega kamparana vivo; ni krome menciuj liajn filojn Petro II (la infera) kaj Petro III (la velura). Tro longa iĝus nia artikolo se ni priparolus ĉiujn. Ni ankaŭ preterpasas la interesajn antverpenajn gravuristojn, kiuj precipe laboris por la fama presisto Kristoforo Plantin (1514?-1589) „la tipografiisto de la reĝo de Hispanujo kaj samtempe la reĝo de la tipografiistoj de sia tempo“, kiu presis 50 verkojn en jaro, entute 1500! Je iu momento li laboris per 22 presiloj, kiam la plej gravaj francaj

tipografiistoj de Francujo en la 16-a jc., la Estienne-oj, neniam havis pli ol 4!

Estas spirita ĝuo admirii liajn domegon, laborejon kaj butikon, instalitajn kiel muzeo — nun renovigita post bomb-enfalo sur la „Vendreda Placo“ kie ĝi troviĝas — en kiu oni popaŝe povas sekvi la historion de la antverpenaj artoj. En tiu domego „ĉiu bruo kvazaŭ silentigis por reporti la vizitanton tute en la sorĉon de la estinteco, kaj malserenigi en nenion lian intelektan revadon.“

La 17-a jc. vidis la materian defalon de nia granda komercurbo, sed vere kurioze, tio ne haltigis ĝian artan genion. Kontraŭe, la gloro de ĝia pentrarto apogeiĝis! Ĉu estas vere necese konigi la „reĝon de la flandra pentrarto“, Petro Paŭlo Rubens (1577-1649), la lernanton de la talentaj Van Noort (1562-1641) kaj Van Veen (1558-1629), Rubens, la gloran pentriston de tiom da satirusoj, faŭnoj, nimfoj kaj Venusoj; la fortikan kolorbrilan pentriston, ĉu kiu ni ne plu trovas la mistikon de Quinten Matsys sed la larĝan, teatran efekton? Antoon Van Dyck (1599-1642) preskaŭ egalas sian mastron. Li estas pli poezie sentema ol li, kaj estas „la reĝo de la portretistoj“. Li longe vivis ĉe la angla kortego.

Antverpeno estas vera muzeo. Krom la ĉefverkoj de Rubens kaj Van Dyck oni admiras skulptaĵojn de Erasmus Quellin (1607-78), pentraĵojn de Jordaens, ankaŭ lernanto de Van Noort kaj kelkfoje eĉ superanta Rubens, kaj de David Teniers II (1610-90) granda moropentristo.

(Fino de la artikolo troviĝas sur paĝo 2-a en la 4-a kolono sub rubriko „Wereldnieuws“.)



Roosje Köhler van Ghelder
(desegnita de Rie Knipscheer, Aldam)

OBSERVOJ

NEMERITITA RIPROĈO.



En multlegata Esperanto-gazeto fama Esperanto-oratoro riproĉas la naciajn Esperanto-organojn, ke ili pli kaj pli emas disponigi spacon por tekstoj en nacia lingvo.

Mi ne komprenas tiun riproĉon! Ni ja faru distingon inter la internacia kaj la nacia Esperanto-gazetaro. Se la unua estas per-esperanta, la dua estas por-esperanta, do ĉefe propaganda. Kaj ĉu ne estus sence, se ili propagandus Esperanton... en Esperanto?

En Esperantujo mi rimarkis jam multajn mallogikajn. Feliĉe mi neniam renkontis internacian Esperanto-gazeton redaktitan en nacia lingvo. Kontraŭe, nacia Esperanto-gazeto redaktita tute en Esperanto ne estas malofta. Ke nun ili tendencas malaperi, nur montras ke ili, finfine, akiris pli bonan komprenon pri racia uzo de mono kaj energio.

Kaj oni ne argumentu ke pro tio la lingva nivelo suferas. Mi povus citi naciajn Esperanto-gazetojn tute redaktitajn en la internacia lingvo kiuj laŭ lingva vidpunkto estas mizeraj, kaj naciajn gazetojn redaktitajn en du lingvoj kies Esperanto-parto lingve estas bona. Se en tiu afero iu estas riproĉinda, tiu am la senpripena riproĉanto!

Pik.

ESPERANTO BESCHERMING VOOR EIGEN TAAL

Wij hebben er steeds op gewezen dat een neutrale internationale taal de ideale bescherming betekent voornamelijk voor „kleinere“ talen die wel eens ernstig bedreigd worden door het imperialisme van machtiger buurtalen.

Aan dergelijk imperialisme, dat aan de zuidkant van ons Nederlands taalgebied niet denkbeeldig is, wijdt „De Toerist“, het orgaan van de machtige Vlaamse Toeristenbond, een volledig nummer. De heer Vital Celen oordeelt streng over tweetaligheid; bedoeld wordt gelijke kennis van twee nationale talen:

TWEETALIGHEID

Een bevolking die de weg opgaat der tweetaligheid is op zeker tijdstip voor haar oorspronkelijke taal verloren. Dit is uitgemaakt door de geschiedenis. Tweetaligheid is een overgangstoestand, waarbij de vroegere taal het onderspit delft. En zo aanvankelijk de indringer eerder langzaam vordert, doordat er weerstand is, gaat het overweldigend snel, wanneer die verzwakt.

Het is ontstellend hoe gauw een stad als Duinkerken verfranste, toen eenmaal die taal aan de winnende hand was. Tot in het begin der 19-e eeuw bleef het Nederlands er de gebruikstaal, maar snel kreeg, ten gevolge van de nieuwe toestand, geschapen door de omwenteling en het Keizerrijk, het Frans de voorrang, omstrecks het midden der eeuw werd het overwegend en op het einde was Duinkerken, dat gedurende duizend jaar Nederlands bleef, zo goed als verfranst.

Is het met Brussel anders gegaan? In 1830 was dit nog een overwegend Nederlandstalige stad en hoe was de taaltoestand er vijftig jaar later?

Uit dit alles blijkt, dat de strijd voor onze taal niet efficiënt geweest is. En zulks omdat men verkeerde wegen heeft gevolgd. Men moet dat inzien en andere wegen inslaan. Het beginsel der eentaligheid van Vlaanderen moet men vooropstellen en de onschendbaarheid daarvan vorderen. Vlaanderen moet het recht opeisen te zijn als een ander volk en land. Een land, waar het een vreemde taal niet geoorloofd is een ongepaste plaats in te nemen.

Een ongeschonden eentalig Nederlands gebied inderdaad. Niets minder.

Accoord zeggen wij, maar Esperanto kome dan in de plaats van deze of gene buurtaal die onze integriteit bedreigt.

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

1. Li mortis pro nesingardemo; lia frato mortis por la patrujo. 2. Ili havis nenion por fari; pro tio ili parolis pri ovoj kaj bovoj por pasigi la tempon. 3. Li finis sian paroladon per adiaŭaj vortoj kaj salutinte nin per la mano li foriris por ĉiam. 4. La profesoro pri matematiko kaj la kuracisto por virinoj dankis min per belaj vortoj pro mia helpo. 5. Li tremis per la tuta korpo pro la malvarmo. 6. Oni estas malavara pri havo najbara. 7. Se vi parolos eĉ per unu vorto pri tio, vi staros per unu piedo en la tombo! 8. Ili estas parencoj per Adamo. 9. Kvankam en ĉi tiu butikoj tiu drapo kostas po dudek frankoj por metro, li pagis en alia butikoj nur kvindek frankojn por trimetra peco. 10. Li diris al mi, ke li venis pro serioza afero, nome por solvi la problemon pri lingvo internacia. 11. Konscia pri la fakto, ke li pravis, li per la pugno batis la tablon por ke liaj kontraŭuloj konvinkigu pri la ĝusteco de lia teorio. 12. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon.

estis farinta. Mi estis domaginta la mono." „Jes, mi ankaŭ ĝi domagis kaj fine trovis la ĝusta solvo. Anstataŭ la monon mi metis ĉeko de dumil guldenoj en lia tombo.“

Vertaal:

1. Hij verzocht me, hem alleen te laten. 2. Hij vroeg me, of ik liever koffie of thee had. 3. Als ge wilt slagen, moet ge zo ijverig mogelijk studeren. 4. Dit pakje weegt twee ons. Ik weet niet, of het andere meer dan 50 gram zwaarder is, want ik heb het nog niet gewogen, maar het gewicht is zeker meer dan 240 gram. 5. Het verheugt me, dat hij over drie weken thuis komt. 6. Het vorig jaar hebben wij met z'n tweeën een reis door Portugal gemaakt.

Vul in, waar nodig, ig of iĝ:

1. Por hundon dron—i oni ĝin nomas rabia. 2. Li mir—is, eĉ konstern—is min pro sia stranga konduto. 3. Li kolektis la pecojn de la romp—inta vazo. 4. La milionulo konstru—is belegan domon. 5. La lafo spruc—is su-

LA STUDANTO

Wereldnieuws

De emigratiedienst in Australië heeft in samenwerking met verschillende Esperanto-organisaties besloten een speciale comité in het leven te roepen voor de immigratie van esperantisten in Australië.

Het Rijksbureau voor Vreemdelingenverkeer in Hongarije heeft een geïllustreerd prospectus in Esperanto uitgegeven.

Ter gelegenheid van de conferentie voor wetenschap, wijsbegeerte en religie, die onder leiding van Mark Starr plaats vond in de Columbia-universiteit in New York, hield Mark Starr zijn rede over internationaal begripen in het Engels en Esperanto.

De medische afdeling voor buitenlandse betrekkingen aan de universiteit in Zagreb heeft een speciale onderafdeling voor Esperanto gesticht.

La influo de Rubens sur la konstru-arto estis grava. Laŭ la de li satata „grek-romana stilo“ li konstruis sian palacon, kiun post ĝia restarigo neniu preterlasas viziti. La riĉe ornamita fasado de la Sankta Karolo-preĝejo kun la granda altaro estas desegnitaj de li kiel ankaŭ la Skeldopordego ĉe la rivero.

Inter la skulptistoj kiuj laboris eksterlande ni menciuj Ludoviko Willemssens (1636-1702), kiu verkis por Willem III kaj altaron en la antverpena ĉefpreĝejo. H. Cosyns kaj Petro Scheermaekers (1691-1770) longe vivis en Londono kaj oni trovas la plej belajn verkojn de Scheermaekers en la abatejo de Westminster. En la tuta mondo troviĝas artaj laboraĵoj de antverpenaj artistoj. Ankaŭ Mihaelo Rysbrack (1692-1770) laboris por la nomita abatejo. J. B. van Kessel en 1698 por la reĝo de Anglujo. A. Van Papenhoven (1668-1759) en la kortego de la sama reĝo. J. Millick ĉe Edwige Eleonore de Svedujo. Van Opstal (1595-1668) iĝis rektoro de la franca akademio de belartoj (1659) kaj diversaj aliaj skulptistoj verkis por la francaj reĝoj.

Pro la daŭraj malfeliĉaj historiaj cirkonstancoj la arta vivo en la 18-a jc. forte malvigligis kaj nur poste en pli paca, moderna tempo Antverpeno povis reakiri la rimarkindan lokon pli frue okupitan.

Car, ho Antverpeno

... vi restis rava

Kun freŝa la mien'

Konscia pri deven'

Vi norda id' kun la triobla krono grava

De forto, riĉo, artrezor'.

Ne atentante pri favor'

Donaca de fremdul, el propra ter' vi fosas

Riĉaĵojn, kaj la propran koron vi mal-

ŝlosas

Por propra la feliĉo. Moroj, lingv', famec'

Ankoraŭ ĉiam estas ja de flandra ec! (1)

H. Vermuyten.

(1) Karel Ledeganck (1805-1847). El tre modesta deveno li, per energia laboro sukcesis akiri la advokat ateston. Li iĝis pacjurgisto kaj poste provinca lernejspektoro. Li estas konsiderata kiel unu el la plej elstaraj lirikistoj de la periodo post 1830. Liaj poemoj: La Poligono, La Piano, Al mia Patrino, k.t.p. apartenas al la komuna literaturo trezoro de nia popolo. Liaj „Tri Fratinaraj Urboj“, lirika „trilogio“, dediĉita al Gento, Bruĝo kaj Antverpeno estis kvazaŭ la poezia evangelio de la flandra movado.

pid—i kaj fin—i mian leteron. 20. Mi surpriz—is pro lia reveno. 21. La pluvo daŭr—is; pro tio ni ne daŭr—is nian promenadon. 22. Bela tapiŝo stern—is sur la planko. 23. La vento forblouv—is lian ĉapelon, kiu forrul—is kaj fine pend—is sur branĉo. 24. Lia kruro romp—is pro akcidento. 25. La vetero estas tre ŝanĝ—ema; jen pluvvas, jen la brul—anta suno preskaŭ suk—fok—as nin.

Vertaal:

Een rechter wees met nadruk op het gewicht van de eed en zei tot de beklagde: „Zeg alleen datgene, waarvan U overtuigd bent. Ik geloofde zeker vanochtend mijn horloge bij mijn gestoken te hebben en nu blijkt het toch, dat ik het op de schoorsteen heb laten liggen.“

Op dit moment verwijderde iemand zich van de publieke tribune. Twintig minuten later belde die iemand aan bij de rechter thuis en zei, dat hij om het horloge kwam, dat Zijne Edelachtbare op de schoorsteen had laten liggen. De vrijwillige boodschapper is nog zoek.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Sept. aan V.E.B., Studento, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A.J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

WINTERTIJD - STUDIETIJD

	Gld.	Belg. Fr.
Voor beginners-cursussen en diploma A:		
Esperanto in 20 lessen, de H. Bakker	2,75	36,—
Sub la verda standardo, de P. Korte (rekta metodo; riĉe ilustrita)		
a. Gvidilo (por la instruisto)	2,50	33,—
b. Memorigilo (por la lernantoj)	0,50	7,—
c. Lernolibro I kaj II (por la lernantoj) po	0,90	12,50
Methodisch leerboek, de J. C. Dirksen	1,25	17,—
Beknopt leerboek Esperanto, de G. H. Benink	1,65	22,—
Leerboek Esperanto, de G. H. Benink	2,10	30,—
La Komencanto, de G. P. de Bruin	1,50	20,—
Vortoj kaj Esprimoj, de Zondervan	1,15	15,50
Esperanto-leerboekje I, de H. A. Appel (vidu la recenon en ĉi tiu numero)	1,50	20,—
Post la kurso, de G. P. de Bruin kaj F. Faulhaber	2,—	27,—
Examenopgaven A en B, met vertalingen	1,25	17,—
Io pri la historio (por A-kandidatoj)	0,25	—
Voor gevorderden en diploma B:		
Tra la labirinto, de F. Faulhaber (handleiding ten dienste van cursuseiders en examencandidaten)	5,90	80,—
Gvidilo tra la Esp.-movado, de G. P. de Bruin	0,95	13,—
Historio kaj Organizo, de G. J. Isbrücker	1,25	22,—
Leidraad bij de studie van de Esperanto-literatuur de G. J. Degenkamp	0,45	6,50
Esperanto-literatuur in vogelvlucht	0,60	8,—
Esperanto 60-jara, de G. J. Degenkamp (skizo pri la evoluo de la literatura lingvo)	1,30	18,—
Hoe kan ik het in Esperanto zeggen?	0,25	5,—
Esprimo de sentoj en Esperanto, de E. Privat	0,85	12,—
Fundamento de Esperanto (Nederl.-Esp.)	0,90	10,—
Fundamento de Esperanto (Esp.)	0,75	—
100 vragen over grammatica en onderwijs	0,35	5,—
Voorzetsels in het Ned. en Esp., de Degenkamp	1,50	26,—
Zakwoordenboekje de H. Alings	0,50	—
Schildlof's woordenboek Esp.-Ned. en Ned.-Esp.	2,75	45,—
Plena Vortaro de S.A.T.	11,50	175,—
Literatuur:		
Fundamenta Krestomatio, de L. Zamenhof	5,20	72,—
Kredu min, sinjorino!, de C. Rosetti (bind.)	5,40	72,—
La mondo ne havas atendejon, de M. Dekker	2,50	34,—
Pro Istar, de H. A. Luyken (bind.)	4,50	61,—
Leteroj de Zamenhof I kaj II (bind.) po	8,55	130,—
La Rabistoj, de Schiller (tr. Zamenhof)	—	30,—
Uzitaj sed bonaspektaj ekz. je favorprezo:		
Marta, de Orzesko, (trad. Zamenhof)	2,—	—
Quo Vadis I kaj II (bind.) kune	5,75	—
Georgo Dandin, de Molière (trad. Zamenhof)	1,—	12,50
La Rabistoj, de Schiller (tr. Zamenhof) bind.	2,95	—
Vivo de Zamenhof, de E. Privat	1,70	—
Fundamenta Krestomatio, de Zamenhof (bind.)	3,95	—
La Revizoro, de Gogol (tr. Zamenhof)	1,45	25,—

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915)
Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

Verbeter de fouten in onderstaande tekst en geef vervolgens de anecdote met eigen woorden weer in Esperanto:

Maljuna komercisto, kiu esti mortota, venigis lia plej kara amiko kaj diris al lin: „Parencoj mi ne havas. Jen, en tiu maljuna kofro kuŝas mia tuta havaĵo, kvarmil guldenojn. Mi akiris ĝi kun peno kaj decidis doni al vi la duonon, kondice ke la alia duono vi metu en mia tombo.“ Tre plaĉis al la amiko la unuan parton de la testamento, sed la dua li ne ŝatis. Li klopodis atingi, ke la mortoto ŝangu sia decido, sed vana. Tial li fine solene promesis plenumi sia deziro. Post la morto de la komercisto li rakontis la rimarkinda fakto al konato, kiun demandis: „Ĉu vi efektive plenigis tiu deziro?“ „Kompreneble, mi ja solene promesis.“ „Nu, tio mi ne

pren el la kratero. 6. Tuj kiam la akvo bol—os, mi kuir—os por vi bongustan mangajaĵon. 7. Mia frato ne interes—as pri Esperanto; kontraŭe min la studo de tiu lingvo multe interes—as. 8. Bonvolu pend—i vian surtuton kaj poste eksid—i. 9. Li kortuŝ—is min per emoci—aj rakontoj. 10. Li facile konvink—as aliajn personojn, sed mem neniam konvink—as pri io. 11. Oni star—is monumenton honore al la inventinto. 12. Mi scivol—as, kiel tiu afero fin—os! 13. La folioj mov—is pro la vento. 14. Li vane klopod—is konvert—i min al siaj ideoj. 15. La rado turn—is tre rapide. 16. Mi facile konfuz—as, do atentu, por ke vi ne erar—u aŭ konfuz—u min! 17. La studo enu—is kaj ted—is ŝin. 18. Mi naŭz—is pro liaj hipokritajoj. 19. La leciono komenc—os je la oka; mi do devos ra-

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA“

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mablesone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuistr. 29, Badhoevedorp Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

ABONNEMENTSPRIJS

Onze abonné's maken we er opmerkzaam op, dat krachtens besluit van de jaarvergadering 1951 de abonnementsprijs van „Nederlandse Esperantisto“ voor 1952 is verhoogd van fl. 2.25 tot fl. 2,50.

Devkonscia L.E.E.N.-anaro,
Senhezite al posteno!
Ŝparu en la nuna jaro
Por kongres' en Antverpeno!

La ĝen. sekr. de L.E.E.N. disponas ankoraŭ pri kelkaj ekz. de la ilustrita faldfolio pri Lago de Como kun 16-paĝa gvidlibreto kaj prospekto de Touring Club Italiano, kiujn li senpage sendas al ĉiu petanto.

EXAMENS ESPERANTO

Examens voor diploma A en B zullen worden gehouden op Zaterdag 3 November a.s. in Utrecht. Onze leden genieten een reductie van 60 pct. op de examengelden. Aanmelden uiterlijk 22 September. Prospectus, tevens aanmeldingsformulier gratis verkrijgbaar bij de secretaresse van de examencommissie, mej. H.M. Mulder, Zilvermewuistr. 29, Badhoevedorp, en bij de alg. secr. van L.E.E.N.

SCHRIFTELIJKE CURSUS

Hebt U kennissen, die Esperanto willen leren, maar niet in de gelegenheid zijn, een mondelinge cursus te volgen? Vestigt hun aandacht op onze

schr. cursus voor beginners, bestaande uit 20 gedrukte lessen met woordenlijst en inleidende les over de hoofdzaken van de Nederlandse spraakkunst. Cursusgeld (individuele correctie inbegrepen) slechts fl. 8,50. Gaarne zendt onze alg. secretaris U enkele exemplaren van ons prospectus, om deze cursus onder de aandacht van Uw vrienden en kennissen te brengen.

PROPAGANDILOJ

Por la propagando ni povas liveri:

„Richtlijnen voor het onderwijs van Esperanto op de school“; broŝuro de s-ro P.W. Baas. Prezo g. 0,04; 10 ekz. g. 0,35; 25 ekz. g. 0,55.

„Wat zeggen ze over Esperanto“, faldfolio de N.C.K.E. (elĉerpiganta). Prezo 5 ekz. g. 0,10.

„Esperanto en Onderwijs“, broŝuro de d-ro W. Manders (elĉerpiganta). Prezo 3 ekz. 0,10.

„Gaat met Uw tijd mee, leert Esperanto!“ dukolora afiŝo kun granda verda stelo kaj spaco por propraj komunikoj pri kurso, propagandvespero, k.t.p. Favorprezo (ĝis 1-10-51) 4 ekz. g. 0,10; 10 ekz. g. 0,20; 50 ekz. g. 0,95.


Ĉiujn suprenomitaĵn propagandilojn vi mendu ĉe la libro-servo, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.

Bonega propagandilo ankaŭ estas „De Esperantist“. Ĝustatempe mendu ekstran kvanton ĉe la administranto s-ro E. A. Burk, Woestduinstraat 58, I, Amsterdam-West. Sendube vi sukcesos vendi ilin okaze de propagandvespero aŭ publika leciono. Se la sekcia kaso tion permesas, senpage disdonu ilin al interesatoj!

KURSOJ KAJ KURSANOJ

Kompare kun la instruo de aliaj lingvoj, la instruo de Esperanto prezentas avantaĝojn pro la relativa facileco de la lingvo, sed ankaŭ gravajn malavantaĝojn. Fremdajn lingvojn oni ja lernas, ĉar oni bezonas ilin por akiri iun diplomon, kies posedo donas la eblon ricevi pli bone salaritan oficon. Oni do serioze studas, tiom pli, ĉar la studado estas sufiĉe multekosta. Esperantajn kursojn kontraŭe partoprenas nur malmultaj personoj, kiuj vere sentas la bezonon; la granda plimulto estas allogata de la propagando. Oni fariĝis scivolaj pri lingvo, kiun oni povas „ludante lerni“ en kelkaj lecionoj; kiu krome „alportos la mondpacon“ kaj „eksterlande ĉie estas parolata“. Jen fiŝpropagando, kiun oni eble faris bonintence, sed per kiu oni ege malutilas al nia movado. Estas vere; pluraj viktimoj estos kaptataj kaj plenkuraĝe komencos la studon, sed jam post kelkaj lecionoj ili, seniluziiginte pro la fakto ke ili devas studi serioze por lerni la lingvon kaj enkapigi vortojn same kiel ĉe alia lingvo, iom post iom forrestos. La perdo de la ofte nur bagatela monsumo, investita en la studo, ne retenos ilin. Ekzistas ankaŭ personoj, kiuj kvankam ne plene posedantaj ĉe la propran gepatran lingvon, tamen volas lerni almenaŭ unu fremdan lingvon, per kiu ili iomete povos kontakti kun eksterlando. Aliaj rigardas la studon de Esperanto agrabla tempopasigo.

La motivoj de niaj kursanoj do ofte estas tre diversaj, sed preskaŭ neniam la kaŭzo estas vera bezono pri la lingvo. Pro tio multaj studas nur supraĵe kaj ofte neregule vizitas la lecionojn. El la nekleraj personoj, kiuj volas lerni Esperanton, eble kvanto vere ekposedos la lingvon, sed la plimulto restos eterne komencanta aŭ balbutanta, ĉar ĝi bezonas du aŭ tri kursojn por ĝisfunde lerni la lingvon. Ankaŭ multaj, kiuj lernas Esperanton nur por pasigi la tempon, restos eternaj balbutantoj. Ili ja deziras distri sin, sed ne studi. Sufiĉas al ili modesta scio pri la elementoj de la lingvo. Kial lerni pli? Oni ja ne bezonas la lingvon kaj jam estas kontentaj, se oni scias iom babilaci pri ovoj kaj bovoj. En la konversaciaj vesperoj oni ja povas komprenigi sin per la nederlanda lingvo! Koncerne klercon kaj la motivojn por lerni Esperanton, la konsisto de la kursanaro do estas tre heterogena, multe pli heterogena ol ĉe alilingvaj kursoj, kaj tiu fakto kompreneble kaŭzas diversajn malfacilaĵojn. Al tio aldoniĝas la fakto, ke tre ofte niaj kursoj estas gvidataj de diletoj anstataŭ de diplomitaj profesiaj instruistoj. Se eble oni dividu la kursanaron en grupojn de personoj pli-malpli same kleraj. Kompreneble ne ĉiam estos eble dividi la kursanojn, ĉar tiu procedo ja postulas pli da mono por salonluc kaj krome la kursgvidanto ne ĉiam disponos pri sufiĉa tempo por gvidi paralelajn kursojn, kaj tiuokaze oni do adaptu la instrumentodon al la plimulto. Pri la instrumentodo do fakte decidus krom la kapabloj de la kursgvidanto, la konsisto de la kursanaro. Ekzistas multaj instrumentodoj, sed se oni komparas ilin, oni baldaŭ konstatos, ke ĉiuj povas esti reduktataj al du, la rekta kaj gramatika metodoj, kaj laŭ la grado en kiu oni miksas ambaŭ, kreigas novaj metodoj. Ambaŭ metodoj estas taŭgaj, sed uzata en sia ekstrema formo, neniu el ambaŭ kondukos al la dezirata celo. La rekta metodo postulas pli da sperto kaj sinpreparo de la gvidanto ol la gramatika, ĉe kiu li povas uzi la lernolibron kiel gvidilon. Tamen la sukceso de la kurso pli dependas de la kursgvidanto ol de la metodo; kurso laŭ la plej efika metodo povas fiaski, se ĝi estas gvidata de nesperta instruisto. La valoro de la metodo do estas nur relativa kaj la samon ni povas diri pri la lernolibro. Ĝenerala plendo estas, ke niaj lernolibroj estas tro ampleksaj kaj lasas apenaŭ tempon por legado kaj konversacio. Kaj kiom ajn grava estas la teorio, la praktiko ja estas almenaŭ same grava, se ne pli grava!



A. J. Kalma, sekretario de L.E.E.N. kaj redaktoro de Nederlanda Esperantisto (desegnigis Rie Knipscheer, A'dam)

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

PREPARA KONGRESLABORO

La antverpena sekcio de F.I.L.E., kiu entuziasme akceptis la organizon de la venonta komuna kongreso de F.I.L.E. kaj L.E.E.N., jam aranĝis du preparajn kunsidojn, en kiuj oni priparolis la ĝeneralajn aferojn kaj superrigardis la disponeblajn fortojn. La 10/9 okazos en Diepestr. 44 - korespondadreso de la L.K.K.-kunveno. Tiam oni surpaperigos la diversajn punktojn, pri kiuj oni definitive decidus en kunsido de la ligo estraro, okazonta nelonge poste. De tiam la kutimaj komunikaĵoj regule aperos en nia gazeto.

ĈU SAMIDEANE ?

Esti membro de nia Flandra Ligo estas tre bone.

Ankaŭ estas tre bone, esti membro de alia Esperanto-asocio, kvankam ni kompreneble preferas vidi vin inter niaj anoj.

Esti membro de pli ol unu asocio montras vian interesigon pri la diversaj aspektoj de nia movado.

Sed esti membro de nia ligo, misuzi tiun membrecon por instigi aliajn anojn al dizerto kaj posta aliĝo al alia asocio estas... nu, kiel nomi tian agadon?...

Kiu tiel kondutos, vekos nur malŝatton ĉe ĉiu ajn (honestaj esperantisto!)

Plaatselijk Nieuws

Rotterdam: Nia sekcio „La Espero“ intencas aranĝi intersekcian dimanĉon la 16-an de septembro en salono Plaswijk. La provizora programo estas alloga kaj varia. Izolaj esperantistoj el ĉirkaŭaj lokoj estas kore bonvenaj. Informojn volonte donos la sekretario s-ro A. Hoogvliet, Watergeusstr. 63, Rotterdam-W.

V.E.B. Afdeling Brussel: Te beginnen op 6 September vinden onze vergaderingen weer geregeld plaats als volgt: 6/9 Bestuursverkiezing 1951/1952 en discussie over de organisatie; 13/9 Lezing „Unua kongres-parolado de d-ro Zamenhof“ kaj „Preĝo sub la verda standardo“ (f-ino M.R. Impanis); 20/9 Verslag van het U.E.A.-congres te München (s-ro Van Gheyt); 27/9 Verslag van het congres van F.E.R.N. te Utrecht (s-ro De Bruyne).

V.E.B. Sekcio Gent: La 27/7 mortis la maljuna patro de nia meritplena ĉefestrarano kaj jam longajn jarojn fidela membrino, fraŭlino J. Terrijn el Gent. F.I.L.E., la redakcio de F.E. kaj ĉiuj geamikoj sincere kondolencas.

V.E.B. Afdeling Mechelen: Ons programma voor het nieuwe winterseizoen en meer bepaaldelijk voor September, ziet er uit als volgt: 5/9 Unua kontaktkunsido; enigmoj; 12/9 prelego de d-ro Van Gindertaelen; 19/9 Gramatika vespero; 26/9 Ĝenerala kunsido; raporto pri la sekcia vivo kaj elekto de la estraro.

De leden worden dringend verzocht trouw de vergaderingen bij te wonen die, zoals vroeger, zullen plaats vinden in het Lyceum, Veemarkt, 39 T/S iedere Woensdagavond te 19.30 u. stipt.

La lernantoj ne tre bedaŭros sian nescion pri diversaj gramatikaj detaloj, sed ege seniluziigos, se montriĝas, ke post la kurso ili ne povas skribi leteron nek iom babilu en la lernita lingvo. La gvidanto jam en la komenco de la kurso paroligu la kursanojn kaj instigu ilin al simpla konversacio. Mem li dum kelka tempo parolu Esperanton por alkutimigi ilin al la novaj sonoj. Ampleksaj lernolibroj ofte devigas la gvidantojn ĉu ne pritrakti la lastajn ĉapitrojn, ĉu forstrecki diversajn detalojn. La dua procedo ŝajnas preferinda. Prefere oni do elektu koncizan kaj facilan lernolibron por ne senkuraĝigi la lernantojn. La gvidanto ja povas aldone instrui tion, kion li opinias necesa. En kelkaj lernolibroj mankas tradukekzercoj el la nacia lingvo en Esperanton. Tiu manko eble havas la avantaĝon, ke la kursanoj pli rapide alkultimigas al pensado rekte en la lingvo mem, sed aliflanke oni konstatis, ke nura aŭdado kaj legado de la lingvo rezultigas pli da lingvaj eraroj ol instruo, kiu krome ampleksas tradukekzercojn. Ne necesas enkapigi al la komencantoj multajn vortojn. Certe sufiĉas por elementa kurso 500 vortoj. La lernantoj ja poste legante kaj konversaciante pligrandigos sian vortrezoron. La kurso mem ne daŭru tro longe. La meza daŭro estu 20 lecionoj kaj la maksimuma daŭro de ĉiu leciono unu horo kaj duono. La kurskotizo ofte dependas de lokaj cirkonstancoj. Sed kiaj ajn estu tiuj cirkonstancoj, neniam aranĝu senpagajn kursojn kaj ne prokrastu la enkasigon de la kurskotizo ĝis la kursfino. Almenaŭ la duono de la ŝuldata monsumo la kursanoj pagu tuj en la unua leciono.

A. J. Kalma

ESPERANTISTA STUDENTA TENDARO EN BORNHOLM

(30 JUNIO — 20 JULIO)

En la nigran kafon trinkanta Danlando studentoj de 6 diversaj nacioj havis la plezuron partopreni la arkeologian tendaron sur la insulo Bornholm en la Baltika Maro. Tie okazis - ni ĉiuj jam legis pri tio - internacia tendaro por esperantistaj studentoj, kiuj intencis pasigi belan ferion en samideana rondo kaj krome ne kontraŭis facilan laboron.

En la proksimo de la dana urbeto Svaneke oni devis elfosi, sub scienca gvidado de dana arkeologo, domon el la ferepoko. La komenco estis, ke la studentoj, entute 13, el kiuj 7 inoj, senvegetajigis terenon, sur kiu kreskis herbo, forprenis jam faritan, sed misfaritan monteton, kaj intertempe ankaŭ deskrapis la teron per iloj, similaj al truloj. Scienculoj oni esploris la deskrapaĵojn, trovis multajn ŝtonojn kaj ankaŭ kelkfoje ian arkeologiaĵon, ekzemple potpecojn. La plej alta celo estis trovi ian feraĵon, kio efektive okazis. Eĉ la domo aŭ almenaŭ io similanta domrestaĵojn estis trovata.

La dana priafera gvidanto multe faris por la partoprenantoj el Finnlando, Svedujo, Norvegujo, Germanujo, Nederlando kaj Danlando ne nur por la propagando de nia lingvo sur la t.n. malplej verda insulo de Danlando - li aranĝis viziton de ĵurnalistoj de la Bornholmaj gazetoj -, sed ankaŭ por la distrado dum la vesperoj kaj la ekskursoj dum la liberaj dimanĉoj. La studentoj ĉiam rememoros la grandan helpon de la urbestro de Svaneke, kiu i.a. mem prizorgis la gastigadon ĉe privatuloj. Sekve la dana gazetaro ofte kaj detale raportis pri la tendaro kaj atentigis pri Esperanto.

Post la du-semajna laboro ĉiuj partoprenintoj iris al Kopenhago por pasigi kelkajn tagojn en la bela dana ĉefurbo. Sub sperta gvidado oni vizitis multajn vidindaĵojn, aŭdis interesegajn prelegojn, kaj ekskursis dum la lasta dimanĉo al Sudselando, kie la klubo de Spjellerup aranĝis belan programon.

Oni povas diri, ke la tuta tri-semajna restado en Danlando por la studentoj bone sukcesis kaj kontribuis al la komprenigo inter la diversaciaj estontaj sciencistoj.

H. M.

FRATO W. VAN ZON †

La 29-an de julio mortis 82-jara la Esperanto-pioniro frato Wigbertus van Zon, kiu ne nur en Nederlando, sed ankaŭ eksterlande estis konata pro siaj agemo kaj propaganda laboro. Ekde sia esperantistigo en 1922 li fervore kaj senlace propagandis, speciale en katolikaj rondoj kaj centojn da personoj li esperantistigis. Multaj gazetartikoloj liaj aperis en sud-nederlandaj ĵurnaloj; krome li verkis kelkajn broŝurojn. Li tradukis i.a. „Kaptitaj en Nubio“ de Sienkiewicz; estis unu el la kunlaborantoj de la Enciklopedio de Esperanto kaj unu el la kompilitoj de „Esperanta Krestomatio“. Multajn kandidatojn li ekzamenis kaj la kunlaboro en la ekzamena komitato estis ĉiam ĝojo, ne nur por frato van Zon mem, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kunlaboris kun li kaj alte taksis liajn toleremon kaj laboremon. Post la sciigo pri resaniĝo lia ni jam esperis renkonti lin denove la 3-an de novembro en Utrecht, sed jen venas la konsterna sciigo pri lia morto... En frato van Zon la nederlanda esperantistaro kaj precipe „Nederlanda Katoliko“ perdis fervoran kaj de ĉiuj ŝatatan pioniron.

Manuskriptoj por la venonta numero atingu la redaktoron antaŭ la 14-a de septembro.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris por VEB, post n-roj 107-108, resp. 109-110: s-ro A. van de Velde el Gentbrugge kaj f-ino C. Boule el Blankenberge.

Por LEEN: s-ro S. Sijtsstra el Bozum (Fr.) kaj f-ino J. v. Thiel el Amsterdam.

SOLVOJ.

N-ro 111. *Horiz.* 2. krani; eldir. 3. per. 4. apoge; emfaz. 5. mi; ja. 6. kontraŭul; 7. reĝ. 8. spic; podi. 9. ond. 10. aneks; alaŭd. 11. tem.

Vert. 1. aklam; eskap. 2. pik. 3. karo; oficej. 5. ŝipestr; ost. 6. regn. 7. teretaj; dam. 9. edif; usonan. 10. ajl. 11. kriza; cindr.

N-ro 112. 1. dinamo. 2. drasta. 3. eldoni. 4. striko. 5. valizo. 6. nobelo. 7. kanapo. 8. saliko. 9. regulo. 10. nuligo. 11. rivalo. 12. buĝeto, 13. bileto. 14. planko. 15. porcio. 16. ekzota. 17. faruno. 18. pasero. 19. maniĝo. 20. fronto. 21. sprita. 22. sukero. 23. trakti. 24. tabelo. 25. veruko. 26. sklavo. Vivu stomako laŭ stato de l' sako.

N-ro 113: KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. kunigilo de korporetaj(R); principo de konduto(R). 3. muziki por kantanto(R); batali(R). 5. kromencitero de la antaŭnomo kun la familia nomo de tradukintino, konata en la Esperanto-literaturo. 6. trinkajo; taĉmento(R). 7. loko(R); vojo(R). 8. substantivo el la titolo de verko elrulsigita de la tradukintino sub 5.(R). 10. malgraŭ ĉio daŭrigi(R); meti sur ion por ĝin kaŝi(R). 12. nombro; ligneca vegetaĵo.

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											
12											

LA PLEJ GRANDA ĈARLATANO

Laŭdire, la jena historio vere okazis, sed antaŭ longe. Temas pri italo, kiu nomis sin Mantacinnic. Iam li vojaĝis al Lyon kaj anoncis ke li inventis viveliksiro, kiu kapablas revivigi mortintojn.

„Atentu,“ li diris al sia kunulo, „kio okazos“ Okazis, kiel li supozis. La atendejo de s-ro Mantacinnic pleniĝis kaj ĉiu petis interparolon.

La unua kiu eniris la akceptejon estis junulo, kiu aspektis sufiĉe diboĉinta. „Mi ne scias, ĉu vi estas mensogulo.“ li diris al la italo, sed se ne, mi petegas vin, ne revivigi mian patron, ĉar mi heredis ĉiom kaj trovis la eblon fordiboĉi ĉiom en kelkaj semajnoj. Mi ne dezirus, ke li eksciŭ tion.”

Post tio la junulo metis altvaloran bankbileton sur la tablon kaj palpebrumante li foriris.

Post la junulo eniris ĉarma sinjorino. Ŝi ruĝiĝis, kiam ŝi diris: „Se tio, kion vi diras estas vera . . . mi petegas vin ne revivigi mian edzon. Mi renkontis alian . . . neniame en mia vivo mi estis tiom feliĉa . . . Kaj ŝi deponis bankbileton.

Tiel la afero daŭris kelkan tempon. Kiam vesperiĝis, la ĉarlatano estis fariginta ege riĉa . . . sed la plejbona ankoraŭ estis venonta. Ĉar tiun saman vesperon, la urbestro de Lyon venis al la italo. „Estimata sinjoro,“ li diris, „mi petegas vin; kompatu nin. Se vi efektivos vian intencion, ni estos nek helpeblaj, nek konsileblaj. Nia administrado estas en bona ordo, sed pro vi ĉio malordigis. La oficistoj faras al si grandajn zorgojn.“ La urbestro serĉis en sia poŝo, metis antaŭ la ĉarlatanon dikan koverton kaj diris: „Bonvolu akcepti tion de ni, sed cetera lasu nin trankvilaj.“ Tamen Mantacinnic ne estis kontenta. „Jes, jes, estas facile al vi paroli tiel. Se mi foriros ĉiu diros: nu, vidu, li ne povas aranĝi sian aferon kaj ili dubos pri miaj superhomaj naturdotoj.“ „Tion ni solvos,“ kvietigis lin la urbestro. „Ni donos al vi ateston en kiu ni deklaras, ke ni propraokule rigardis vian miraklon . . .“

Ĉis nun pli granda ĉarlatano ol Mantacinnic ankoraŭ ne naskiĝis!

trad. J. Rooker.

Vertikale. 1. anonci dangeŝon(R); sendi al difinita loko(R). 2. sendubiga aserto. 3. renkontita post serĉado(R); revuo(R). 4. devojigi(R). 5. duonsfera tegmento; malplenigi glason(R). 6. prepozicio. 7. lerte klopodi por atingi celon(R); donanta forton por daŭrigi la vivon. 8. bezoni trinkajojn(R). 9. arigi disaĵojn(R); malbona sonĝo(R). 10. ekstrema flanko(R). 11. ĝi troviĝas sur skribotablo(R); definitive forigi(R). 12. ĉevalo ĝin satas(R).

N-ro 114: KUNMETU

el la subaj litergrupoj 23 naŭliterajn vortojn laŭ jenaj klarigoj. Iliaj duaj literoj, samorde legataj, formas proverbon.

Klarigoj: 1. virina vestaĵo ĉe laboro. 2. facile flamiĝa komponaĵo el kamforo kaj nitrocelulozo el kiu oni fabrikas diversajn objektojn: skatoletojn, pupetojn, k.t.p. 3. konfuzega, nekomprenebla diraĵo. 4. punbruligo de herezuloj. 5. kandidato. 6. muzikilo. 7. movi sin alten. 8. elektrumi. 9. konstruaĵo apud fervojo. 10. el ĝiaj fadejoj oni tekas delikatan ŝtofon. 11. akcesora, iom malhelpa fakto. 12. domfarbisto ĝin uzas. 13. politika konservemulo, celanta revivigi la pasintan staton de la aferoj. 14. detala listo de objektoj apartenantaj al iu. 15. kaŝpolicano. 16. plivastigo. 17. ruĝeta. 18. sumo anticipe pagata. 19. ravanta per beleco. 20. besto kiu onidire ŝanĝas sian koloron. 21. entenita, kvankam ne formale esprimita. 22. sciante ĝin, oni facile trovas disaŭdigon ĉe radiatoro. 23. tapeto.

Litergrupoj. adm, ago, ako, ant, ant, aro, aro, asp, aŭp, aŭt, aŭt, cel, cid, det, eks, ekt, ele, ele, ent, ero, feo, gal, ide, ido, ima, imp, inc, inv, ira, iri, iri, ita, ivo, izi, kam, kei, kol, kra, ktr, lic, mur, nda, ngo, nto, nto, oda, olo, omo, ond, ono, ono, ora, pan, pap, pet, rdi, rea, ren, roz, sil, sio, sta, sup, ŝtu, tio, uko, ulo, ulo, ŭpo.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 h.s., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20-IX-'51.

Deziras korespondi Soiči Hori, 38-jara asista profesoro de universitato kun botanikisto, eĉ amatora, adr. 298 Otsu-Seioji, Maebashi, Gumma (Japanujo).
Deziras korespondi membro de Esp. Grupo „Prospero“, 22b Neustadt/Weinstrasse, Hambacherstr. 66 (Germ.) kaj pluraj japanoj, adr. Japan L.P.F. club, P.O. Box 19, Shinjuku, Tokyo

Jus aperis:

ESPERANTO - LEERBOEKJE

voor de lagere school en voor hen, die geen ander dan lager onderwijs genoten.

Eerste deeltje - door H. A. Appel Bergen op Zoom. Pr. g. 1,50; fr. 20. Mendu ĉe niaj libroservoj.

ESPERANTO - TERA PENSO

(aŭdaca teorio)

*La majstro en junula aĝo
Per la poemo „Mia Pensio“,
Kun larm' amara sur vizaĝo,
Oferis koron for al mensio.
Pliposte per poemo „Preĝo“,
Petegis li pri paco tera
El amo, vero, - kies lego
Mirkreskis el ĉi pens' mistera.*

*Ho tera paco, tera penso
Homama, vin fidelis restis
La majstro ĉiam kun intenco.
Sed ĉar esence li modestis,
Li vortojn „tera penso“ kaŝis
En pseŭdonimon „Esperanto“,
Kaj samideanaro paŝis,
Nescie, poste kun konstanto
En lia sulko kun la flago:
- Tera Pensio - (Esperanto)
Pelata ŝajne al la ago
Per sorĉe distilita brando!*

TYNEVERUM.

CURSUSLEIDERS

ontvangen op aanvraag een present-exemplaar van de leergang

Esperanto in twintig lessen

Hans Bakker. v. Tuyl v. Serooskerkenplein 33, Amsterdam Z



Thor Heyerdahl: *Ekspedicio Kon-Tiki* el la norvega de C. Bruynilssen kaj lingve prilaborita de S. Engholm; eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1951, 210 p. Prezo: gld.

Jen belega libro, pro kies eldono ni nepre gratulu E.S.E.-on! Oni ja rimarku ke la luksa blua orpresita bindaĵo entenas foliojn el luksa papero kun multaj fotografaj. Kaj, jen, la prezo — kvankam sumiganta sv. kr. 16,75 — ne superas tiun de la svedlingva eldono, kvankam la eldonkvanto de ĉi tiu estas 100.000 ekz. kaj de la Esperanta traduko nur 3.000!

Kion diri pri la enhavo? Resume: ĝi indas la eksteron de la libro, kvankam oni povus same bone diri la inverson.

Ses viroj, gvidataj de la aŭtoro, volis prui ke, en la 12-a jarcento, la gentestro Tiki, elpelita el Peruo en Pacifikon, povis atingi Polinezion (je 8.000 km-a distanco) sen ŝipoj, tiutempe ja ne ekzistantaj. Ili do uzis, laŭ la teorio de la aŭtoro, flosojn . . . kaj nia seso flosis dum pli ol 100 tagnoktoj — kompreneble ne sen aventuroj — kaj sukcesis!

Jen do la rakonto, kiun prezentas al vi la aŭtoro; la eksto de la ekspedicio, la travivaĵoj de la partoprenintoj dum la okazoplena flosado, bildoj pri la batalo kontraŭ la ondoj, la marbestoj kaj aliaj baroj, la vivo sur la flosa, la vizito kaj akcepto de la ekspedicio ĉe la indigenoj.

La teksto estas vigla kaj streĉa — la lingvo tre bona: lingva prilaboro de S. Engholm ja garantias tion!

Resume: libro nepre havinda, tiel pro la enhavo kiel pro la „vesto“!

T.V.G.

Faldfolio de Touring Club Italiano, Corso Italia 10, Milano (Ital.), kun informoj pri la servoj de T.C.I. kaj ĝiaj multaj eldonajoj. Senpage havebla.

„Munkeno salutas vin“, gvidlibreto pri München kun multaj fotoj. Eld. Verkehrsverein, Sonnenstr. 24, München (Germ.).

„Iom pri Stokholmo“, plaĉa ilustrita gvidlibreto pri la urbo Stokholmo kaj ĝiaj plej gravaj publikaj konstruaĵoj, kun interesaj informoj pri sociaj kaj ekonomiaj temoj (domkonstruado, flegado de malsanuloj, instruado, sporto k.t.p.). Eldonita de S.A.T. (67 rue Gambetta, Parizo XX) okaze de la 24-a kongreso de S.A.T. kun financa helpo de Sveda Laborista Esperanto-Asocio, ĉi tiu libreto donas utilajn informojn al ĉiu, kiu intencas viziti la svedan metropolon. Lingvaĵo tre bona. Prezo 2 sv. kr.

Reinhold Conrad Muschler, *la nekonnatino*, el la germana trad. L. Goppel, eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg (Germ.). Ĉefpersono de ĉi tiu novelo estas Madeleine Levin, knabino 21-jara kun artismaj inklinoj, kiu post la morto de sia severa onklo intencas realigi sian ĝistiaman revon: iri Parizon por tie malfermi modalonon. Survoje en Marsejo la sorto konatigas al ŝi lordon Thomas Vernon Bentick, diplomaton, kiu akompanis tien sian fianĉinon, kiu estas vojaĝanta al Egiptujo por tie serĉi taŭgan loĝejon por ambaŭ. Madeleine akceptas lian proponon aŭtomobile veturi kun li al Parizo kaj jen komenciĝas epizodo, kiu decidis pri la vivo de Madeleine. Ili enamigis unu al la alia, sed ili restas fidelaj; li al sia fianĉino kaj ŝi al sia pasinteco de honoro kaj pureco. Sed post lia foriro ŝi ne povas forgesi la amaton kaj iras renkonte al li en la akcepteman akvon de Seine: „ŝia vizaĝo, glorigita, ridetis, kiam oni trovis ŝin“. La enhavo estas leginda priskribo de la veturo tra francaj urboj kaj de la evoluo de la sentoj de ambaŭ gejunuloj; ĝi krome estas delikata kaj trafa. La traduko de ĉi tiu 66-paĝa novelo ĝenerale estas tre bona, kvankam ni notis kelkajn detalojn, kiuj koncernas ĉefe malbone kompreneblajn esprimojn aŭ idiotismojn kaj la uzon de la pezaj kunmetitaj tempoj, sendube pro fideleco al la originalo. Kelkaj neologismoj (parkumi, glugli, frikaso, tablojdo) pro sia internacieco aŭ la kunteksto ne bezonas klarigon. Budito = kwikstaart; vistario =? Lingvajn erarojn ni trovis nur malmultajn, ekz. bani anst. bani sin; emociiga anst. emocia; plaĉis al ŝi la popola vivo pro ĝia (anst. sia) multkoloro. La nur malmultaj preteraroj ne estas ĝenaj. Ĉi tiu novelo, jam tradukita en multajn aliajn lingvojn, certe estas gajno por nia tradukita literaturo laŭ enhavo kaj lingvaĵo. Ankaŭ la eksterajo estas bone prizorgita. Prezo bind. 3 gmk.; broŝ. 2 gmk. plus afranko 10%.

H. A. Appel, *„Esperanto - leerboekje voor de lagere school en voor hen, die geen ander dan lager onderwijs hebben genoten“*; eerste deeltje. Ĉi tiu nova lernolibreto de s-ro H. A. Appel, kiu estas destinita speciale por la 5-a klaso de elementaj lernejoj, distingigas per diversaj bonaj kvalitoj, prezentante plurajn avantaĝojn, kiujn ne havas aliaj lernolibroj. La prononcado ne estas pritraktita tuj en la unuaj lecionoj sed ĝia pritrakto finiĝas nur en la 12-a leciono. La nombro da gramatikaj terminoj kaj la vortprovizo estas reduktitaj al minimumo. Malrapide, kaj konstante ripetigante la jam pritrakitajn gramatikajojn, la libreto kondukas la lernantojn de unu malfacilaĵo al alia kaj multaj ekzemploj klare ilustras la regulojn kaj gramatikajojn. Ne antaŭ la 18-a leciono la aŭtoro pritraktas la demandajn vortojn ĉu kaj nur poste la demandajn vortojn, kiu, kie, k.t.p. Tio laŭ ni estas malavantaĝo, ĉar nun ja mankas materialo por instigi la lernantojn al simpla konversacio per frazoj pli „vivaj“ kaj allogaj ol la frazoj en la lernolibro, kiuj ja ofte estas sufiĉe tedaj kaj neinteresaj. Detale kaj feliĉe nur en la 13-a leciono la aŭtoro pritraktas la rektan objektan komplementon kaj per multaj ekzemploj li klarigas la vortordon tiom, kiom ĝi devias de la nacilingva vortordo. Ni preferus ne diferencigi inter objektaĵ kaj cirkonstancan komplementoj (kiel lernanto scianta nenion pri rektaj cirkonstancan komplementoj ekz. traduku la frazon „tien kaarten kosten één gulden“?) sed nur inter rektaj kaj nerektaj komplementoj, kaj forstreki frazojn kiaj „la arbo ne falos sur la muro“ kaj „la forko falis en la akvo“, en kiuj oni ja preferu uzu la direkton montrantan literon n. Kial akcepti frazojn kia „mi deziras, ke vi nun foriras“, kiujn oni devos korekti en la dua volumo, pritraktante la finaĵon u? Strange impresas rekta objekta komplemento en la frazo „mi devas paroli la viron“. En la 25-a leciono aperas kelkaj ekzemploj kun adverba finaĵo e (estas varme; estas bone) sed klarigo mankas, same kiel ĉe aplikoj de „da“ post kiom, tiom k.t.p. en la 39-a leciono. La aŭtoro prave lasas al la lernanto la taskon apliki la afiksojn, kies signifoj klare montriĝas el la multaj ekzemploj en la vortlistoj. Traleginte la libreton ni konvinkigis pri tio, ke s-ro Appel sukcesis kompili taŭgan lernolibretan, kaj pritraktis la diversajn gramatikajojn en maniero kiu ne fortimigas la lernantojn. Ni volonte rekomendas ĉi tiun lernolibretan, kiu en 40 mallongaj lecionoj enhavas nur la ĉefajn gramatikajojn (la resto troviĝas en la espreble baldaŭ aperonta dua volumo) al ĉiuj gvidantoj de infankursoj kaj al personoj, kiuj en aliaj elementaj lernolibroj renkontas nevenkeblajn malfacilaĵojn. Prezo g. 1,50; b. fr. 20; havebla ĉe niaj libroservoj.

POETOJ EN TRADUKO

BALADO PRI LA KAMPULO (BALLADE VAN DEN BOER)

J. W. Werumeus Buning

*Tri krucoj staradis sur Golgotha
Sed li plugis plu la kampul'.
Magdalena, Maria, Veronika,
Sed li plugis plu la kampul'.
Kaj fine ĉe la terpeca lim',
Turninte l' plugilon li
Genufleksis ĉe l' plugil' kaj anim'
Elaŭdigis de l' kampul'.*

*En multaj vivis ja bela rev'
Sed li plugis plu la kampul'.
Thermopilae, Troja, Seramis,
Sed li plugis plu la kampul'.
Verdiĝis ĉiam juna gren',
Lumiĝis la stelar',
Mondluktis diu vort', postul'
Kaj ĝin aŭdis la kampul'.*

*Forbrulis krime l' kampulej',
Murdigis bov', edzin',
Sed jungis kampul' sin mem al plugil'
Kaj li plugis plu la kampul'.
Suriris Alpoj Napoleon',
La kampulo laboris plu, -
Veturis al Sankta Helen' insul',
Kaj li plugis plu la kampul'.*

trad. H. Vermuyten.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.).